**UEA / ILEI Internacia Ekzamena Komisiono**

**Ekzamenoj por blinduloj**

**Temas pri ekzamenoj pri lingvokapablo**

# Detala regularo kun ekzemploj, kriterioj kaj poentokalkulado

*Enkonduka noto: ĉi sube legiĝas "la kandidato"; tio signifas "la kandidato / la kandidatino"*

GRAMATIKA TESTO

Ĝi konsistas el 30 frazoj duopaj (entute 60), unu ĝusta, unu malĝusta. La kandidato aŭdas ilin legatajn de du malsamlingvaj ekzamenantoj dufoje kaj devas diri, kiu frazo estas ĝusta. . Du membroj de LEK (ne samlingvanoj) legas, la tria notas la rezultojn.
Ekzemple : 1) a) li lavas sin kun sapo / b) li lavas sin per sapo. 2) a) Li desegnas ĝardeno / b) li desegnas ĝardenon.

Sukceslimo : 20 ĝustaj respondoj

La kandidato devas sukcesi tiun gramatikan teston por iri al la ĉefa parto de la ekzameno.

## ĈEFA PARTO DE LA EKZAMENO

UNUA PARTO: SINPREZENTO DE LA KANDIDATO

Ĝeneralaj informoj. 10 minutoj.

Maksimuma atingebla poentonombro: 30 poentoj

DUA PARTO: LINGVAJ DEMANDOJ, GRAMATIKAJ ASPEKTOJ

Du ekzamenantoj de malsamaj lingvoj laŭtlegas 30 frazojn triopajn (entute 90). Unu el la tri frazoj estas ĝusta, la du aliaj estas malĝustaj. La kandidato devas diri, kiu frazo estas ĝusta. Oni legas la triopon trifoje.
Ekzemple :
1) a) li iras al la ĝardenon / b) li iras la ĝardene / c) li iras en la ĝardenon.

2) a) Li kuŝas en la liton / b) Li kuŝiĝas en la liton. / c) Li kuŝigas en la liton.

Ĉiu ĝusta respondo donas 5 poentojn.

Maksimuma atingebla rezulto: 150 poentoj.

## TRIA PARTO: PRISKRIBO DE 5 PALPENDAJ OBJEKTOJ

LEK preparas 20 palpeblajn objektojn. Objektoj povus esti ekzemple banano, ŝlosilo, okulvitroj, T-ĉemizo, ktp.
Ĉiu objekto ricevas numeron inter 1 kaj 20. La kandidato elektas laŭ hazardo 5 objektojn dirante kvinfoje iun numeron inter 1 kaj 20. La kandidato devas priskribi 5 objektojn unu post la alia. Plej bone la priskribo sekvu jenan vojon:
La kandidato parolas pri la ecoj de tiu objekto.
La kandidato parolas pri la materialo de la objekto.
La kandidato parolas pri la uzo de tiu objekto (kiam, kie, al kiu tia objekto povas utili).
La kandidato diras sian opinion, ŝaton, malŝaton pri tiu objekto.

Kriterioj: prononca ĝusteco, lingva ĝusteco (gramatiko), trafa vortuzo, klara kaj logika enhavostrukturo.

La kandidato ricevas maksimume tri poentojn por ĉiu kriterio. Do por ĉiu objekto li / ŝi povas ricevi 12 poentojn.

Maksimuma atingebla rezulto: 60 poentoj.

## KVARA PARTO: PREZENTO DE SITUACIOJ EL LA VIVO

Estas 5 kampoj. Por ĉiu kampo estas 10 demandoj sur 10 paperetoj. En ĉiu kampo la kandidato elektas laŭ hazardo unu demandon; membro de LEK laŭtlegas la demandon. La kandidato devas pritrakti ĝin.

La kampoj estas:
Vivrakonto
Esperantistiĝo
Kontaktoj kun esperanta kulturo
Kontaktoj kun esperantistoj
Ĉiutaga vivo

Demandoj pri vivrakonto povus aspekti jene:
Kie vi naskiĝis?
Kiel aspektas via familio, ĉu vi havas gefratojn?
Kiom longe vi studis?
En kia(j) lernejo(j) vi studis?

Ĉu vi studas aù laboras?

Kriterioj: prononca ĝusteco, lingva ĝusteco (gramatiko), trafa vortuzo, klara kaj logika enhavostrukturo.

La kandidato ricevas maksimume tri poentojn por ĉiu kriterio. Do por ĉiu situacio li / ŝi povas ricevi 12 poentojn.

Maksimuma atingebla rezulto: 60 poentoj.

## KVINA PARTO : LEGA KOMPRENO

La teksto estas maksimume unu paĝon longa (literoj Arial, grandeco 12). La kandidato ricevas ĝin per brajla skribo. Ĝi estas de meza malfacileco. Venas 10 demandoj pri ĝi.

Parolante, la kandidato resumas la legitan tekston kaj respondas al la demandoj priaj.

Kriterioj:  lingva ĝusteco (gramatiko), trafa vortuzo, klara resumo de la enhavo de la teksto, trafaj respondoj al la demandoj.

La kandidato ricevas maksimume dek poentojn por ĉiu kriterio.

Maksimuma atingebla rezulto: 40 poentoj.

## SESA PARTO: PAROLA ARGUMENTADO

Temoj povus aspekti jene:
Vegetaranismo, ĉu adekvata dieto?
Mediprotektado aŭ agado por paco, kio plej urĝas?
Muziko mildigas morojn (franca proverbo)

La kandidato parolas dum kvin ĝis dek minutoj pri la elektita temo. Sekvas diskuto kun LEK pri tiu temo.

Kriterioj: lingva ĝusteco (gramatiko), trafa vortuzo, klara kaj logika enhavostrukturo.

La kandidato ricevas maksimume 20 poentojn por ĉiu kriterio.

Maksimuma atingebla rezulto: 60 poentoj.

## FINA REZULTO

Suma maksimuma atingebla rezulto: 400 poentoj.

Sukceslimo: 60%
Sukceslimo por atingi la mezan nivelon: 80%
Inter 240 kaj 319 poentoj la kandidato ricevas atestilon pri elementa nivelo.
Ekde 320 poentoj la kandidato ricevas atestilon pri meza nivelo.

Laŭ la cirkonstancoj LEK povas decidi pri sukceso kaj nivelo en kazo de malgranda manko. LEK rajtas puŝi iun kandidaton supren, ne suben. Devas esti unuanima decido de la tri membroj de LEK.

Mirejo Grosjean, prezidanto de Internacia Ekzamena Komisiono IEK

Nynäshamn, Svedio, 2009-09-18

Akceptita de IEK per perreta voĉdono la 30an de septembro 2009